

ĈEA-komunikoj 3/2008

CxEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Cxehxa Esperanto-Asocio sendata al cxiuj rete atingeblaj membroj de CxEA sed ankaux al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Cxehxio. Gxi neniam enhavas aldonajxojn. Se vi tamen ne volas ricevadi gxin, sufcixas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

ENHAVO:

1. Esperanto-Muzeo en Svitavy jam naskigxanta
2. La grava kongreso de CxEA en Přerov proksimigxas
3. InPaSem nuligita
4. Turistoj kaj amantoj de naturo kolektigxos en Karlštejn
5. Postferia renkontigxo en Strakonice
6. Trejnseminario pri Vikipedio dum KAEST
7. Nova societo "E-lingvo"
8. Cxehxa Esperanto-Junularo aktivas (oficiala rubriko de CxEJ)
9. Kalendaro de Esperanto-eventoj en Cxehxio

1. ESPERANTO-MUZEO EN SVITAVY JAM NASKIGxANTA

Kiel ni jam informis, septembre estos inauxgurita la nova Muzeo de Esperanto en la urbo Svitavy. Danke al la peno de lokaj esperantistoj, al la aktiva sinteno de la muzea estraro kaj de gvidorganoj de la urbo ni fine akiris monsubtenon de la Cxehxa Kulturministerio.

Nun atendas nin ankoraux ses semajnoj de pena laboro pro preparo de la ekspoziciejo kaj de la unua ekspozicio.

La solena inauxguro de la muzeo okazos sabate la 20-an de septembro, sed la kunigita programo dauxros gxis dimanxco la 21-a. Interesatoj pri la tranokto informigxu pri ebloj cxe Libuše Dvořáková <dvor.libuse@seznam.cz>

2. LA GRAVA KONGRESO DE CxEA EN PŘEROV PROKSIMIGxAS

Ka kongreso de CxEA okazos de la 3-a gxis la 5-a de oktobro en Přerov. Pli detalajn informojn kaj aligxilon vi trovis en Starto n-ro 2 kaj ili estas troveblaj ankaux sur la pagxoj www.esperanto.cz. Dum la kongreso estos ne nur elektita nova komitato de CxEA, kiu gvidos nian asocion dum la venontaj tri jaroj, sed ankaux estos prezentita la venkinta propono de la nova asocia insigno (logoo) de CxEA. Krom la laborkunsido atendos la partoprenontojn kultura, eduka kaj amuza programeroj. Do ne prokrastu vian aligxon!

3. InPaSem NULIGITA

La Internacia Paroliga Semajno, kiu devis okazi en septembro, devis esti

nuligita la unuan fojon en sia historio. La cxefa kialo estas, ke la iniciatinto kaj tradicie la plej granda grupo de francaj fervojistoj anoncis, ke cxijare ili pro malmultaj aligxintoj ne venos - kaj ankaux de aliaj landoj (inkluzive Cxehxion) estis nur unuopuloj, dum minimuma nombro de partoprenantoj (kondicxo de la konferencejo) estas 15. Cxiuj, kiuj aligxis kaj antauxpagis, jam estis informitaj kaj rericervis sian monon, tamen estas grave atentigi tion, por ke ne aligxu eventualaj novaj interesatoj. Laux la interkonsento kun la franca organizanto, ni ne nuligas tiun sxatatan tradician arangxon, nur transsaltas unu jaron.

4. TURISTOJ KAJ AMANTOJ DE NATURO KOLEKTIGxOS EN KARLSxTEJN

Inter la 23-a kaj 30-a de auxgusto okazos jam tradicia internacia renkontigxo de biciklo- kaj pied-turistoj, cxifoje en Karlštejn, la koro de Bohemia Karsto proksime de Prago. Pli da informoj vi trovos cxe <http://www.kava-pech.cz/ekotur>. Atentu, ke jam necesis malmendi la neuzotajn cxambrojn. Kvankam versxajne restos sufcixe da disponeblaj, necesas ke la novaj interesatoj antaux ol pagi unue atendu sciigon, ke por ili vere estas liberaj lokoj en la elektita tranoktokategorio. Ne aligxis multaj, tamen temos pri vere internacia medio, cxar venos esperantistoj krom el Cxehxio ankaux el Bulgario, Francio kaj Germanio.

5. POSTFERIA RENKONTIGxO EN STRAKONICE

La E-klubo LA PONTO el Písek kore invitas vin al unutaga postferia renkontigxo en Strakonice, kiu okazos sabate 13.9.2008 de la 9-a horo. Kromalie oni komune partoprenos prelegon de Ingx. Pavel Pavel, fame konata transsxovinto de la paskinsulaj statuoj, kaj sekvan diskuton kun li.

Detalaj informoj kaj aligxiloj gxis 15.8.2008 cxe VeraMuchnova@seznam.cz aux telefone 721 633 741.

6. TREJNSEMINARIO PRI VIKIPEDIO DUM KAEST.

Dum la cxi-jara Konferenco Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST) en Dobřichovice la 7-an gxis 9-an de novembro okazos Trejnseminario pri kontribuado de fakaj artikoloj al la plej grava malferma reta enciklopedio, Vikipedio. Gxin gvidos Pavla Dvořáková kun la helpo de Mirek Malovec kaj László Szilvási.

Dum la konferenco prezentos prelegojn el diversaj fakaj temoj partoprenontoj el minimume Cxehxio, Hungario, Danio, Germanio, Rusio kaj Slovakio. Eblas ankoraux aligxi (gxis la 15-a de auxgusto ecx kiel preleganto sendante titolon de sia kontribuo kaj proks. 50-vortan resumon). Atentu, ke la plej favora periodo por aligxi dauxtras nur gxis la 1-a de auxgusto (por la membroj de CxEA kaj SKEF gxis la 15-a de auxgusto). Pli da detaloj kaj aligxiloj cxe <http://www.kava-pech.cz/kaest>

7. NOVA SOCIETO "E-LINGVO"

La nove fondita societo "E-lingvo" prezentas sian retejon cxe la adreso <http://www.elingvo.eu>
Gxi celas konvinki la publikon kaj entreprenistojn, ke ili postulu, uzante logikajn kaj proveblajn argumentojn, subtenon de politikistoj por Esperanto.

8. CxEHxA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS (oficiala organo de CxEJ redaktata de Marek Blahuš)

Cxehxa Esperanto-Junularo (CxEJ) kun siaj partneroj eklaboras pri la Internacia Junulara Kongreso (IJK) kiu en 2009 okazos en Liberec. Al la cxi-jara IJK en Hungario aligxis jam 10 cxehxoj (al la tujantauxa UK aligxis 6 cxehxaj junuloj). Lige kun IJK 2009 komence de junio Marek BLAHUŠ, revenanta el Poznań, vizitis Liberecon por esplori pri surlokaj kondicxoj kun tie studanta Dáša CHVÁTALOVÁ.

La 12-an de julio 2008 je 13:00 en Prago edzigxis Tomáš BŘICHÁČEK, unu el la tri refondintoj de CxEJ en 2005. Pro cxeesto de 11 CxEJ-anoj (kaj 1 eskterlandano) la edzigxo senintence farigxis plej granda kunveno de CxEJ gxisnune. Bondeziroj al Tomáš kaj lia edzino Jana!

La 26-an de majo 2008 cxe la Fakultato de informadiko de la Masaryk-Universitato en Brno bakalauxrigxis Marek BLAHUŠ, sukcesinte en sxtatekzameno pri aplikata informadiko kaj defendinte sian disertajxon "Literumilo por Esperanto", verkitan kadre de projekto de E@I.

Raportajxojn pri siaj vojaĝoj en Cxehxio, Auxstrio kaj Pollando pretigis Mirek HRUŠKA. Ili kaj cxiuj aliaj aktualajxoj pri cxehxa junularo troveblas cxe <http://cej.esperanto.cz/>

9. KALENDARO DE ESPERANTO-EVENTOJ EN CxEHxIO

En la kalendaro estas envicigitaj nur la eventoj, kiuj okazos en Cxehxio, aux organizataj el Cxehxio. La eventojn en eksterlando vi trovos cxe <http://www.eventoj.hu/kalendar.htm>.

Cxar ekde la pasintaj CxEA-retkomunikoj ni ricevis anoncon de neniu plia arangxo krom tiuj menciitaj kiel apartaj punktoj, ni cxi-foje ne ripetas gxin. Sed bonvolu kompreni, ke ni ne povas anonci arangxon, pri kiu ni ne scias. Tial gravas, ke vi tuj post la firma decido pri arangxo de iu okazajxo sendu informon al chrdle@kava-pech.cz. Gxi enhavu dato(j)n, lokon, nomon de la arangxo kaj la retadreson (aux retpagxon), kie eblas ricevi pliajn informojn kaj aligxilojn.

Nur de la organizantoj dependas, kiel ricxa estos nia kalendaro!